

Zhāng Jiǔ Líng,
La akvofalo

tradukita de Xiong Linping

De alto de dek-mil futoj,
kvazaŭ de la ĉielo
la kaskado fluge ĵetas sin suben,
kaj ĉirkaŭ ĝi prezentiĝas
nimbo jen ruĝa jen purpura.
Ĝi, ŝajnante esti ĉielarko sub la suno,
rekte falas inter arboj kaj tra la nebulo;
en la serena vetero aŭdeblas
bruo de vento kaj pluvo.
Kiel majestas la monto Lushan!
La nebulo kaj la akvo harmonie
kunfandiĝas en fean iluminacion.

...

Zhāng Jiǔ Líng,
La akvofalo

tradukita de Manfred Retzlaff

Blinde sin ĵetas purpur' akvofala
en la abismon tie ĉi.
Kaj disiĝas la ruĝo kaj pala
akvofumo eliĝas el ĝi.
De l' altej' nebulvualo
subeniĝas tie ĉi,
ĝi ruliĝas tra la valo,
de la arboj gutas ĝi.
Glime sur la ŝaŭm' ŝvebanta
estas arko el odor'
kaj la akvo estas bruanta
kvazaŭ tondro en la for'.
El la verdo de l' arbaro
rokoj supren levas sin.
La prafort' de l' vivantaro
bolas jen en la ravin'.

...

Zhāng Jiǔ Líng,
Der Wasserfall

tradukita de Manfred Hausmann

Blindlings schießen die purpurnen Wasser
über den Abbruch und dröhnen hinab.
Und die Röte zerreißt und ein blasser
Gischtrauch zuckt aus dem Felsengrab.
In den Himmeln, in den Tiefen
wehen Schleier und erglühn.
Sträucher wabern, Bäume triefen,
wo die Nebel niedersprühn.
Glimmend auf dem Schaum der Schründe
schwebt ein Bogen aus buntem Duft.
Und das Stürzende brüllt, als entstünde
Donner um Donner in klarer Luft.
Aus dem Grün der Wälder wuchten
Klippen empor zu toter Gestalt.
Aber in den hallenden Schluchten
rast des Lebens Urgewalt.

...

Zhāng Jiǔ Líng,
Hú kǒu wàng lú
shān pù bù shuǐ

Wàn zhàng hóng quán luò
tiáo tiáo bàn zǐ fēn
bēn liú xià zá shù
sǎ luò chū chóng yún
rì zhào hóng ní sì
tiān qīng fēng yǔ wén
líng shān duō xiù sè
kōng shuǐ gòng yīn yūn

...

Traduko de la ĉina poemo “Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ” de Zhāng Jiǔ Líng en Esperanton de Xiong Linping.

Arg-987-1991 (2014-04-03 10:44:09)

Traduko de la ĉina poemo “Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ” de Zhāng Jiǔ Líng en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-12.

Arg-987-1993 (2014-04-07 16:42:27)

Traduko de la ĉina poemo “Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ” de Zhāng Jiǔ Líng en la Germanan de MANFRED HAUSMANN (*1898-09-10 – †1986-08-06).

Arg-987-1992 (2014-04-07 16:37:35)

La poemo aperis en la libro “Hinter dem Perlenvorhang”, Gedichte nach dem Chinesischen von Manfred Hausmann, Verlag S. Fischer, 1954. Pri la poeto vidu ankaŭ la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann. Manfred Hausmann verkis tiun ĉi poemon laŭ poemo verkita de la ĉina poeto Tschang Tschiu-Ling resp. Chang Chiu-ling (673–740). Pri la poeto vidu la vikipediejon http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Jiuling. Legu ankaŭ: http://en.wikisource.org/wiki/A_Chinese_Biographical_Dictionary/Chang_Chieu-ling.

Verkinto de tiu ĉi ĉina poemo estas Zhāng Jiǔ Líng.

Arg-987-1990 (2014-04-04 19:34:22)

Pri la poeto vidu la retejon <http://ja.wikipedia.org/wiki/えきぞうじゅん> respektive http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Jiuling. La titolo signifas: “De Hukou mi rigardas la akvofalon de la monto Lushan”.